



MALGRANDA

N:RO 2 **REVUO** 1943

1-a JARO

PREZO: 1:– Kr.

ENHAVO:

	Paĝo
Informe	1
Ligo de homoj, de Stellan Engholm	3
Papilio, de P. Th. Justesen	6
Juda amiko, de Gunnar Furhammar	10
Fuĝo, de Nils Ceder	13
Kaj poste Pinokjo, de Szilágyi	22
Estonteco de idealismo, de Ajo Allinger	26
Klubaj taskoj, de Stellan Engholm	29

Informe.

Al aĉetantoj kaj revendantoj de la unua n-ro de Malgranda Revuo mi dankas pro afabla intereso kaj helpo.

De la unua n-ro mi vendis 400 ekz. en Svedujo. 50 ekz. estas venditaj en Finnlando. La vendonombro certe indikas, ke troviĝas intereso por revuo, sed el eldona vidpunkto ĝi estas tro malalta. Por ke la enspezoj egalu la elspezojn, mi bezonas ankoraŭ 200 aĉetantojn.

Ĉar daŭrigo ankoraŭ estas necerta, mi ne povas akcepti jarabonon. Se la nombro fariĝos kontentiga, mi volonte akceptos jarabonon. Tio simpligus distribuon.

La prezo eble ŝajnas al vi alta. La supra mencio montras, ke ĝi ne estas troa. Se la vendonombro iam permesos tion, mi aŭ malaltigos la prezon aŭ donos pli da paĝoj al la revuo.

Estas malfacile havigi artikolojn. Mi volonte akceptos kontribuojn kaj belliteraturajn kaj aliajn. Tre dezirindaj estas artikoloj fakaj kaj ĝenerale kulturaj. Por aperintaj artikoloj mi pagas honorarion, kvankam mi ne povas multe pagi. Oni ne povas eldoni altkvalitan revuon sen rekompenco al artikolverkantoj, nek en nacia lingvo nek en esperanto.

Se vi sendos artikolon, afable maŝinskribu ĝin, se estas eble por vi, kaj skribu kun tuta liniinterspaco!

En n-ro 1 afable korektu: p. 6, linio 9 de malsupre anst. praktiki — praktiki; p. 10, linio 7 de malsupre anst. ilia — sia; p. 11, linio 5 de malsupre anst. iliaj — siaj.

Samideane

Stellan Engholm

Ligo de homoj

De STELLAN ENGHOLM

Per tre malgranda libreto Zamenhof en 1887 transdonis sian lingvon al la mondo. Tri paĝoj en tiu kajereto enhavas po kvar malgrandajn formularojn kun jena teksto: "Mi, subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson". La formularojn la homoj eltondu, subskribu kaj sendu al Zamenhof. La rezulto ne estis sukcesa.

Kiam ni legas pri tio, ni verŝajne ridetas kaj pensas: Zamenhof tamen estis naiva, havis tro grandan esperon pri la homoj.

Estas facile por ni diri tiel, estas facile por ni opinii, ke ni estas pli saĝaj kaj pli bone konas la homojn. Sed ĉu efektive ni estas pli saĝaj?

Ni kredas, ke esperanto iam estos mondlingvo, aŭ ni almenaŭ deziras, ke ĝi fariĝu mondlingvo. Kial ni tion deziras? Por ke la popoloj interfratiĝu, por ke ĉesu la militoj. Kion ni faras por realigi nian deziron? Ni partoprenas kursojn, ni pli malpli funde lernas la lingvon, ni sentas nin kiel dignaj portantoj de mondhistorie grava ideo. Ni propagandas, parolas plenvoĉe al ĉiuj flankoj pri nia grava lingvo, sendas petskribojn al diversaj aŭtoritatoj, faras proponojn al institucioj kaj registaroj. Kaj ĉio estas tre interesa kaj amuza, ĝis ni subite rimarkas, ke nia afero ne plu prosperas, ke la samideanoj komencas flustri sian entuziasmon, ke la gejunuloj interesas sin ne pri nia lingvo sed pri aliaj pli malpli stultaj aferoj.

Al mi ŝajnas, ke ni ne estas malpli naivaj ol Zamenhof. Ni havas iom da amuza kaj agrabla kunvivo en niaj rondoj kaj cetere ni esperas, ke institucioj, aliaj homoj, neesperantistoj, faru nian lingvon mondlingvo. Tio estas, kvazaŭ Paŭlo, la apostolo, estus irinta al institucioj kaj aŭtoritatoj en Romo por persvadi ilin akcepti kristanisman kiel religion por la Roma imperio. Vi certe diras, ke tiu komparo ne taŭgas, ke lingvo ne estas komparebla al religio, kaj ke nuntempaj homoj tamen povas agi racie, laŭ sia prudento. Mi tamen kredas, ke estas proksimume sama afero. La homoj en ĉiuj aferoj opinias bona, racia kaj prudenta nur

tion, kio respondas al iliaj jam ekzistantaj opinioj, al iliaj gustoj kaj antaŭjuĝoj.

Persone mi kredas, ke nia proponado al institucioj kaj aŭtoritatoj kaj nia propagando por esperantoinstruo en la lernejoj ne donos grandan rezulton. Per tio mi ne volas diri, ke oni ĉesu tiun agadon. Provado ne malutilas. Kaj se la provado ne sukcesos, ni konduku same kiel Zamenhof. La dek milionoj da promesoj ne venis. Sed li ne plendis pro tio, li ne forlasis sian laboron por tio. Esperanto ne fariĝis interŝtata kodo, sed anstataŭe ĝi fariĝis vivanta lingvo de malgranda sed tutmonda amikaro.

Eĉ se esperanto en tre proksima tempo estus akceptata kiel interŝtata lingvo, tio certe ne signifus plenumon de niaj deziroj. Nia celo vere estas ne nur tio, ke oni interŝtate uzu esperanton anstataŭ la anglan aŭ la francan aŭ alian nacian lingvon. Verŝajne oni per ĝi pli bone komprenus la vortojn unu de la alia. Sed kie volo mankas, malmulte helpas vortoj. Se du ŝtatoj faras kontrakton, minimume unu el ili havas la intencon tiri kiel eble plej grandan avantaĝon de la kontrakto por poste rompi ĝin. En tia okazo la rezulto ne fariĝus alia, se la kontrakto estus skribita en esperanto.

Ĝenerala uzado de esperanto ne sufiĉas por ni. Nia celado estas paco, interfratiĝo, bona homa kunvivo sur la tero. Maŝineca aplikado de esperanto neniel ŝanĝus la sintenon de la ŝtatoj, el kiuj almenaŭ kelkaj kiel avidaj rabobestoj atendas la momenton, kiam ili povos forpuŝi alian kaj mem akiri pecon por si. Nia tasko ne estas krei ligon aŭ ligojn de nacioj sed ligon de homoj, tutmondan komunecon inter homoj.

Kiam la juna kristanismo ankoraŭ estis ligilo inter homoj, komuneco inter individuoj, tiam ĉiuj kristanoj vere estis gefratoj, sendepende de raso, nacieco, socia rango ktp. Kiam la eklezio fariĝis religia ŝtato kaj fine splitiĝis en diversajn religiajn ŝtatojn, tiam kristanismo ĉesis esti translima ligilo inter la homoj. De tiam kristanoj trompas kaj malbone traktas unu la alian, subpremas unu la alian, konsentas mortigi unu la alian.

Kiel mi diris en la unua numero, la esperantistoj jam nun formas malgrandan internacian socion de bona homa kunvivo. En tio kuŝas tre granda spirita valoro, kiun ni zorge gardu kaj kiel eble plej forte prosperigu. Ĝi estas unika instrumento por

homa interfratiĝo. En la esperanta socio ĉio, kio estas komuna por ĉiuj homoj, kunligas nin, kaj tio, kio ne estas komuna, ne disigas nin.

Sed ĉu havas sencon daŭrigi, ĉu efektive ni iam "atingos la celon en gloro"? Neniu homo kaj neniu homgrupo povas krei paradizon sur la tero. Sed persiste kaj fidele laborantaj homoj povas fari multe da bono. Ĉu ne estas tiel, ke jam nun la esperanta laboro kaj kunvivo donas al ni kontenton kaj enhavas sencon, eĉ iom da vivosenco? Kaj nekompareble pli multe ni povos atingi, reale atingi.

Tial ni senĉese kaj senlace daŭrigu nian laboron. Tre grave estas, ke la tuta esperanta socio iom post iom akiros pli kaj pli seriozan koncepton pri sia afero. Ni devas fariĝi internacia rondo de efektiva kulturo. La nuntempa kulturo estas grandparte nur distro por la homoj, preterflirtantaj ombroj sur filmotuko. Vera kulturo, vera spirita vivo signifas turmentan laboron, intensan luktadon, profunde seriozan rigardon sur la vivon. Sed ĝi signifas ankaŭ la plej grandan feliĉon de homa spirita vivo.

En ĉiuj landoj de la mondo troviĝas ankoraŭ multe da homoj, kiuj sentas kaj pensas kiel ni. Ni serĉu ilin, por ke ili donu novan forton al nia laboro. Ni ĉiuj uzu nian tutan forton kaj nian tutan pensopovon por trovi novajn metodojn por efektive fari ion per nia movado kaj nia lingvo. Kiam niaj organizoj en si havos tiom da kulturo kaj kreopovo, ke aliaj homoj rimarkos ilin kaj ekvidos valoron en ili, kiam niaj libroj kaj revuoj havos tian nivelon, ke ankaŭ aliaj deziros profiti de ili — tiam ni ne estos vane laborintaj. Kaj se nia tutmonda ligo de homoj iam atingos tiun nombron, pri kiu revis Zamenhof, kaj se ĝi restos kultura kaj kulturkreanta rondo — tiam ĝi certe tre multe signifos en la mondo.

Sed ni devas fidi al propraj fortoj, devas mem labori, senĉese kaj senlace.

Papilio

De P. Th. JUSTESEN

Estas nur malgranda papilio, pri kiu mi rakontos; sed ĝi estas unu el miaj fidelaj amikoj. Ĝi tiam kaj tiam vizitas min, kaj ĝi ĉiam portis ĝojon al mi.

Kiam mi estis lernanto, mi estis tre diligenta kolektanto de insektoj. Tiu okupo donas ĉiuokaze tiun avantaĝon, ke oni poste en la vivo dum multaj okazoj kun kompreno kaj revidoĝojo rigardas multajn aferojn, kiujn la pli multaj personoj tute ne rimarkas. Tiel certe estas tre malmultaj, kiuj atentis pri Vanessa polychloros, iu sufiĉe bela sed ne tre okulfrapa taga papilio, kiu tre similas la ordinaran urtikan papilion, Vanessa urticae. Ĝi troviĝas tie ĉi en Danujo, sed oni ne povas nomi ĝin ordinara, kaj dum ĉiuj jaroj, kiam mi estis aktiva kolektanto, mi ne vidis ĝin eĉ unu fojon. Ĝi neniam troviĝis en mia kolekto. Sed jen iun tagon, tuj post mia abiturienta ekzameno, mi subite ekvidis ĝin, sidantan sur malgranda floro en la ĝardeno de miaj gepatroj. Ĝi levis kaj mallevis siajn flugilojn, fojon post fojo, tiel ke mi povis bone rigardi ĝin, kaj ĝi ne estis timema. Mi ankaŭ ne ĝenis ĝin sed ĝojis pro tio, ke mi ankoraŭ povas trovi danan papilion, kiun miaj okuloj antaŭe ne renkontis.

Dek du jarojn poste mi venis al Sumatra, kaj tie mi ja trovis tute novan bestomondon. Ĉiun tagon kaj kie ajn mi vidis amasojn da pompaj papilioj ĉirkaŭflugi, kaj ili ĝojigis mian koron. Iun tagon dum ekskurso en la praarbaro mi venis al la bordo de rivero. Mi iomete iris antaŭen sur la sablo laŭ ĝi, kaj jen mi subite renkontis rimarkindan vidaĵon. Sur forte sunlumigita loko sidis granda amaso da papilioj, unu tute proksime eĉ alia, de multaj diversaj specoj, unu pli bela ol alia. Unue mi dum kelka tempo observis ilin en certa distanco kaj miris pri tio, ke ili ĉiuj tiel longe restas senmovaj. Pri kio ili povas okupi sin tie sur la sablo? Singarde mi iris pli proksimen, kaj jen mi estis tute apud ili. Eĉ unu el ili ne movis sin. Sed inter ili mi rekonis Vanessa polychloros! En la sama momento mi ekvidis antaŭ mi la ĝardenon de miaj gepatroj. Estis malgranda peco de Danujo, kiu montris sin por mi tie meze en la fremdo. "Ĉu vi estas tie ĉi, mia amiko? Afable estas, ke vi venas por viziti min", mi pensis,

kaj mi estus povinta karesi ĝin; sed verŝajne ĝi ne estus bone kompreninta tion. Sed pri kio okupis sin la papilioj? Nu, tion mi rapide trovis. Ĉiuj estis elrulintaj siajn suĉilojn kaj borintaj ilin profunden en la sablo. Ili trinkis de la fluidaĵo sub la surfaco. Kaj senĉese falis grandaj akvogutoj de ilia intestofino, proksimume unu en ĉiu sekundo. Eble oni povas plej bone diri tiel, ke ili lavis siajn digestorganojn, aŭ ke ili freŝigis sin interne meze en la dolĉa suno. Ili ebriiĝis sin en ĝuado, kaj ili tiom forgesis la mondon kaj la ekziston, ke mi sukcesis preni unu el ili per du fingroj sen iu ajn maltrankvilo de la aliaj. Mi tuj lasis ĝin fuĝi, kaj senprokraste ĝi sidigis sin apud la aliajn kaj reprenis sian okupon.

Dudek naŭ jarojn poste, en 1921, mi vojaĝis al Aŭstralio. Verdire mi estis survoje al Danujo tra Ameriko, sed prokraste mi restis en la kvina mondoparto — pro scivolemo. Kiam mi veturis suden laŭ la orienta bordo de Aŭstralio kun la kontinento sur unu flanko kaj la granda koralrifo sur la alia, mi rigardis kun certa malagrabra sento tiun landon, kiu estis tute proksima. Sufiĉe krutaj bordodeklivoj, kovritaj de fajrodetruitaj arbaroj. Kilometron post kilometro neniu homo, neniu domo, neniu kabano. Morto! Morto! Per ĉiu tago fariĝis pli kaj pli malvarme, kaj mi havis fortan senton, ke mi proksimiĝas al la fino de la mondo. Mi ja estis ankaŭ proksimume tiel malproksime de Danujo, kiel estas eble veni. Poste fariĝis pli bone, kaj Brisbane, Sidney kaj Melbourne montris al mi, ke estas homoj ankaŭ en tiu lando, kaj ke ili loĝas en grandaj urboj, tute eŭropaj, aŭ eble pli bone diri tute amerikaj. Sed danoj la aŭstralianoj ne estis.

Iun tagon mi estis kun mia edzino kaj miaj kvin infanoj en la zoologia ĝardeno de Melbourne, kaj la infanoj estis en ekstazo pro la multaj bestoj. Ni iris de kaĝo al kaĝo kaj parolis dane abunde. Sed ni ja ne estis solaj, kaj subite mi rimarkis, ke nin ĉirkaŭas granda homamaso, kiu tute ne interesas sin por la bestoj sed nur por ni. Ili gapis al ni, fingromontris al ni, ridaĉis al ni kaj evidente interparolis tre vigle pri ni. Kaj kiam ni iris al alia kaĝo, ili ĉiuj sekvis nin, kaj ili fariĝis pli kaj pli multaj. Unue mi tute ne komprenis la sencon de tio; sed iom post iom la kaŭzo klariĝis al mi: ili aŭdis, ke ni parolas fremdan lingvon, kaj kredis, ke ni estas germanoj — pasis ja ne longa tempo post la

paciĝo. En la amaso estis ankaŭ policisto, sed li kondukis tute kiel la aliaj. Mi demandis lin: "Kion volas ĉiuj tiuj homoj?" sed li ne respondis. Ni ne povis fari ion alian ol forlasi la ĝardenon, kaj grandaj grupoj sekvis nin ĝis la elirejo. Sur la vojo hejmen, meze en dezerta kaj laŭ mia opinio malgaja strato mi subite ekvidis papilion, kiu dancis antaŭ mi. Estis Vanessa polychloros! Estis saluto el la hejmo, kaj ĝi tuŝis min profunde.

Pli malfrue plenumiĝis deziro, kiun mi longe portis. Fariĝis por mi eble pasigi kelkajn monatojn en Egiptujo kaj studi ĉiujn mirindaĵojn, kiuj troviĝas tie. Inter alie mi kompreneble kelkajn fojojn estis sur la supro de la piramido de Keopso, kaj precipe la unua el tiuj vizitoj estas por mi neforgesebla.

La honorinda piramido estas dum la forpaso de la tempo terure malbontraktita de krudaj manoj. Ĉiuj tegoplatoj kaj amasoj el la grandegaj, kubaj blokoj, pli ol unu kubmetron grandaj, estas fortrenitaj kaj uzitaj por konstrui domojn en Kairo. Ankaŭ la supro malaperis. Tial oni plej supre trovas malgrandan kvadratan plataĵon kun la flankoj almenaŭ 12 metrojn longaj. Estas iom malfacile rampi supren laŭ tiu gigantoŝtuparo; sed la afero valoras la penon. De tie oni havas vidon kiel nenie aliloke en la mondo. Oni elrigardas sur la flavan sablon de la dezerto. Ĉe la piedo de la piramido kuŝas la majesta sfinkso. Kelkcent metrojn malproksime estas malgranda oazo, fasko da migdalarboj. Ĉe la horizonto briletas en la suno la multaj moskeoj kaj minaretoj de Kairo.

Estis posttagmezo, kiam mi surgrimpis la piramidon, kaj centoj da turistoj svarmis ĉirkaŭ ĝia piedo, kie ili inter alie rigardis la multajn, multajn elfositajn tombojn, tutan subteran urbon, kiun oni trovis tie. Okaze mia rigardo renkontis forte gestantan arabon, kiu interparolis kun distingitaspekta eŭropano. Ambaŭ rigardis supren laŭ la piramido. La eŭropano elprenis sian horloĝon, kaj jen la arabo subite atakis la ŝtonkoloson, saltis kiel kato de bloko al bloko kaj en nekredeble mallonga tempo venis supren al mi. Tie li restis staranta unu sekundon, kun supren etenditaj brakoj, kaj poste komenciĝis la malsupreniro, kio certe estis la plej danĝera, Li faris ĝin en same furioza takto, kaj post kelkaj momentoj li denove staris apud la eŭropano, kiu elprenis sian monujon kaj pagis al li la evidente interkonsentitan

premion. Poste mi eksciis, ke tio estis la vivtena profesio de tiu arabo, kaj ke li ĉiam kontraktis, ke li kuros supren kaj malsupren en 8 minutoj. Ok minutoj! Supren kaj malsupren sur 137 metrojn alta ŝtuparo kun tiaj ŝtupoj!

Interesa fenomeno estis ankaŭ la piramida vento, kiu blovas preskaŭ vertikale supren. Ĝi venas galope el la dezerto; sed kiam ĝi atingas la piramidon, ĝi grimpas ĝin ankoraŭ multe pli vigle ol la arabo. Ĝi kuregas supren laŭ la flanko kaj alten al la ĉielo. Kiam oni staras tuj apud la rando de la plataĵo, oni troviĝas en plena ŝtormo; sed se oni faras nur malgrandan paŝon malantaŭen, oni troviĝas en kompleta kvieto. Mi restis kelkajn horojn tie supre kaj vidis, kiel la piramida ombro kreskas pli kaj pli longa sur la brila sablo, kaj la tutan tempon mi estis sola kun arabo, kiu ludis kafejon tie. Tamen ne! Ne tute sola. Estis ankoraŭ unu, kaj tio estis la plej granda mirindaĵo el ĉiuj, Vanessa polychloros! Subite ĝi venis flirtante kaj sidigis sin antaŭ miaj piedoj, kaj kiam la suno fine estis subirinta kaj mi komencis la malsupreniron, ĝi ankoraŭ estis tie. Sur la supro de tiu giganta ŝtonkoloso, kun dezerto sur ĉiuj flankoj! Papilio, kiu vivas de mielo! Kion ĝi volis tie? Ĉu ĝi venis ĝuste por viziti min? Kaj kio fariĝis el la malgranda kompatindulo? Mi volonte volis helpi ĝin, sed kion fari?

Kaj poste mi denove vidis ĝin en 1931. Mi tiam estis anstataŭa komunuma kuracisto sur la Feroaj insuloj, en Thorshavn. Mi restis tie 9 monatojn, la tutan someran duonjaron kaj iom de la vintro, kaj multajn ekskursojn mi faris piede, kaj en la ĉirkaŭaĵo de Thorshavn kaj sur la aliaj insuloj, parte profesie, parto pro propra intereso; sed eĉ unu papilion mi ne renkontis, eĉ ne modestan tineon. La Feroaj insuloj estas tre belaj, sed antaŭ ĉio ili estas markitaj de soleco, manko de vivo. La herbo flustras en la vento, iun fojon krias korvo, povas okazi, ke leporo subite ekkuris kaj malaperas inter la ŝtonoj. Cetere nenio! Kaj jen iun tagon mi estis survoje de Thorshavn al Kollefjord. La vojo iras sur alta kaj vasta plataĵo. Tute apud la plej alta punkto malgranda akvofalo ĵetas sin kiel edziniĝa vualo malsupren sur rokomuro. Kaj tie flugis Vanessa polychloros! Nur momenton mi vidis ĝin, poste ĝi flugis for kaj malaperis. For en la solecon. Sed al mi ĝi estis doninta neatenditan ĝojeton.

Kelkajn jarojn antaŭ la milito mi korespondis kun judo en Jerusalemo, vera tipo de sia popolo. Li rakontis, kiel li dum la unua monda milito studis en hungara liceo. Fininte la lernejon li 17-jara devis iri en la militon, kie li batalis kiel soldato du jarojn.

"Dum tiuj teruraj jaroj miaj haroj fariĝis tute blankaj", li skribis, "kaj mi maljuniĝis same kiel miaj suferantaj kamaradoj en la tranĉeoj. Sed kial mi batalis? Tion mi ne scias. Kiam mi disŝirita, mortlaca kaj kaduka kiel maljunulo revenis hejmen, mi volis daŭrigi miajn studojn. Mi komencis en la universitato, ĉar mi deziris fariĝi kuracisto. Sed subite la hungaroj forgesis, ke ankaŭ la judoj batalis kaj suferis kune kun ili sur la batala kampo, kaj ke multaj judoj mortis por Hungarujo. Ili komencis insulti kaj persekuti nin. Ni devis forlasi nian naskiĝan regionon por studi en aliaj landoj, kie la malamo kontraŭ la judoj ne estis tiel granda kiel en Hungarujo. Sed kial? Pro tio ke ni estas judoj? Pro tio ke ni devas suferi eterne? Sed kial? Kial?"

Ĉu ni ne havas sentojn? Ĉu ni ne povas senti ĝojon kaj malĝojon kiel aliaj homoj? Ĉu ni ne suferas, kiam oni kraĉas en nian vizaĝon? Ĉu ni ne estas homoj?

Se mi legas la historion de la judoj, mi vidas en ĝi nur sangon kaj ree sangon. Junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj estis mortigitaj per diversspecaj torturiloj nur pro tio, ke ili estis judoj...

Forlasinte Hungarujon li restis kelkan tempon en Ĉeĥoslovakujo kaj komencis studi en la universitato de Praha. Baldaŭ venis tamen malfacilaĵoj ankaŭ tie, ĉar mankis mono. Por pagi la studŝuldojn li okupis sin pri multspecaj laboroj. Li laboris ekzemple en fera produkto, vendis diversajn etvarojn, portis valizojn de vojaĝantoj ĉe stacidomoj ktp.

Baldaŭ tamen fariĝis neelteneble ankaŭ en Praha. Sed cedi li tute ne volis. Tial li komencis vagadi kaj ree vagadi, kaj fine li venis al Jerusalemo. Sed ankaŭ tie ne estis por li trankvilo, ĉar tie la araboj, estante plimulto en la lando, volis ĵeti ĉiujn judojn en la Mezan maron. Ne strange, ke li elkrias: "Kien ni iru?"

Kiam mi petis lin diri al mi, kiel li, estante judo, konsideras

la persekutojn kaj la judan problemon, li opiniis, ke ĝi multparte dependas de envio. Ofte judoj en lernejoj havis la plej bonajn skribajn atestojn, kaj pro siaj diligenteco kaj energio ili ofte sukcesis pli bone ol aliaj.

"Estas vere", li ironie aldonas, "ke inter la judoj ekzistas friponoj kaj trompantoj, sed inter aliaj nacioj ekzistas ja nur bonaj homoj, ĉu ne?"

Kompreneble estas pri la judoj kiel pri aliaj nacioj. Ili havas siajn bonajn kaj malbonajn flankojn. Se estas, kiel multaj diras, ke ĝuste la negocaj talentoj karakterizas multe da judoj, oni devas pripensi, ke la eŭropanoj dum jarcentoj devigis ilin vivi sub esceptaj leĝoj. Ili rajtis dediĉi sin nur al negocoj por nutri sin. Ja ne estus strange, se tiel iliaj negocaj "talentoj" evoluis pli ol ĉe aliaj. Kiaj ni svedoj estus, se ni dum jarcentoj estus devigitaj vivi en similaj cirkonstancoj?

"Kiam oni kraĉas sur ŝtonon, ĝi fariĝas malseka", kaj tial homoj tiel ofte forgesas la bonajn flankojn de tiuj, kiuj estas objektoj por moko. Kiom da homoj pripensas aŭ scias, ke 18 judoj ricevis Nobelpremion? Tio montras ja, kiom multe nia kulturo ricevis de la judoj, kaj kiom ni ŝuldas al ili.

Tiuj kaj multaj aliaj pensoj aperis, kiam mi relegis la leterojn de mia juda amiko kaj pripensis la nunajn okazintaĵojn en la mondo.

Li atentigas pri io, kio ŝajnas al li stranga, nome pri tio, ke judo tuj estas distingata kiel judo, kiam li faras iun malbonon. "Se svedo nomata Lagerlöf aŭ Strindberg faris ion malbonan", li skribas, "oni diras al li 'Vi malbona Lagerlöf' aŭ 'Vi malbona Strindberg'. Sed se judo nomata Weizmann faras la samon, oni ne diras 'Vi malbona Weizmann!' sed 'Vi malbona judo!' Kial? li demandas. Jes, strange. Kial?"

Koncerne tion, ke la judoj ĝenerale estas tiaj lingvaj geniuloj, li diras, ke ili ofte devas migri de lando al lando pro persekutoj. En Palestino (ne pli granda ol Dalekarlio) kun unu miliono da loĝantoj oni parolas ĉirkaŭ 60 lingvojn. Sed la enmigrintaj judoj venis ja ankaŭ el ĉiuj anguloj de la mondo. Li mem parolas la lingvojn hungaran, germanan, anglan, hebrean, araban kaj esperantan.

Malgraŭ tio, ke Palestino estas malgranda, li diras, ke ĝi estas

malplena lando, kaj ĉar la judoj estas popolo sen lando, ĝi ja konvenas por ili. Sed kion diras la arabaj loĝantoj pri tio? Kial ili volas ĵeti la judojn en la Mezan maron?

La araba kontraŭstaro estiĝis pro propagando el ekstere. Ne estis, ĝenerale, la araboj en Palestino, kiuj partoprenis la unuajn tumultojn. La teroristoj transvenis — post malsukcesa ribelo en Sirio — al Palestino kun armiloj. Fakto estas, ke la nun falinta Mussolini donis al ili kaj monon kaj armilojn. Tuj antaŭ la nuna milito estis granda nombro da eksterlandaj ribeligantoj kontraŭ la judoj en la lando. Kiel la stato estis tie pli frue, oni povas kompreni de la Araba Deklaracio de 1 marto 1919, kiu ne estis malamika sed tre amika al la judoj.

Ĝi inter alie diras: "Ni araboj, speciale la kleruloj inter ni, rigardas kun plej profunda simpatio la cionistan movadon. Ni volas al la judoj eldiri nian plej bonan bonvenon ĉe ilia reveno al la hejma lando. Ni volas niaparte fari nian plej bonan por helpi ilin al venko." Sed la propagando en Palestino same kiel en aliaj landoj aliigis multe en la lasta tempo.

Mi demandis lin, kial li ne volas akcepti la kristanecon. "Kiel mi povus fariĝi kristano", li respondis, "kiam la kristanoj mortigas tiom multaj el miaj samnacionoj?"

Tio, se io, estas granda akuzo kontraŭ elvojigita eklezio, eklezio sen la kristana spirito. Sed samtempe certe ne estas iu popola grupo, kiu en ĉiuj landoj tiel firme rifuzis malamon kontraŭ la judoj, kiel la persone aktivaj kristanoj. Kaj en nia tempo estas pozitiva ago resti netuŝebla de anima infekto kaj kontraŭ malamo starigi amon. Kie la kristanoj vorte kaj fare aperis kiel veraj disĉiploj de Kristo, ilia agado bone influis al la judoj.

Tion oni vidis ekzemple en la hejmo por rifuĝantoj de Sveda Misia Federacio en Tostarp, Skanio. Pluraj judoj diris, ke nur tie ili por la unua fojo spertis, kio estas vera kristana spirito kaj kompreno. Judino el Vieno, kiu antaŭe ne estis en kontakto kun aktivaj kristanoj, aŭdis en Tostarp la unuan fojon en sia vivo la vortojn pri amo (1 Kor. 13 ĉap.). Pro la afableco, kiun ŝi renkontis en la hejmo, la vortoj faris al ŝi tiel grandan impreson, ke ŝi tuj petis pri instruado en la kristanismo, kio montras, ke judoj, same kiel aliaj homoj, povas esti influataj de afableco. Certe mia amiko en Jerusalemo ne estus havinta tiom da dubo pri

la kristanismo kaj la "kristanoj", se li estus spertinta afablecon same kiel tiu judino. Ŝi poste enmigris Usonon, kaj de tie mi ricevis leteron de ŝi, en kiu ŝi (estas nur paranteza rimarkigo) sendas kristnaskajn salutojn, kiujn mi pro malfruiĝo de la letero ricevis nur la Johanan tagon, kio ankaŭ montras siamaniere, kiel renversita nia nuna mondo estas.

En la nuntempa mallumo mi tamen ĝojas, ke la judoj, kiuj ĵus venis el Danujo kaj el aliaj lokoj, estis tiel bonvole akceptataj de la svedoj.

Jam antaŭe mi estis interesita de la judoj kaj la juda problemo, kaj kiam mi komencis korespondi, precipe kun la nomita judo en Jerusalemo, mi fariĝis ankoraŭ pli interesita, kaj mi diras: Ni faru en la estonto ĉion, kion ni povos, por forigi la malamon, kaj por helpi kiel eble plej multe la judojn, kiuj nun suferas pli ol iuj aliaj sur nia tero.

Fuĝo

De NILS CEDER

Håkan vekigiĝis en sia sofo kaj trovis, ke li denove malsekigis dum la nokto.

Li tre ektimis, ĉar li faris la samon antaŭ nelonge. Kaj kiam oni havas ok jarojn, oni tute ne rajtas fari tiel.

Li ja ne povas helpi, ke venas tiel en la nokto, kiam li dormas. Sed aliaj infanoj neniam faras tiel, eĉ se ili estas nur kvarjaraj. Eble dependas de tio, ke Håkan foje ne bone preparas sin en la vespero. En vintraj vesperoj estas malagrabla mallumo ekstere ĉe la neceso. Tie povus stari vagabondo aŭ hundo.

La patrino foje fariĝas nekonvene laŭtvoĉa. Akcepti vergadon — nu jes. Sed ke ĉiuj aliaj ekscias pri tia afero — ĉiuj gefratoj kaj Emil ĉe onklino Johansson kaj Valle en la malgranda domo, tio signifas dutagan honton. Tio signifas minimume du tagojn kun malgaja izoleco.

Tiun ĉi fojon ja ne minacis tuja verdikto. La patro jam frue

estis ĉe la fervojo, kaj la patrino kalandris en la subtegmentejo, li bone aŭdis tion. En la kuirejo kverelis Erik kaj Maj pri la posedrajto pri la kristnaskodonaca sledeto. Hâkan leviĝis kaj vestis sin per ĉemizo, subveŝto, longaj ŝtrumpoj, genupantalono, ŝuoj kaj robeto. Li esploris la teruraĵon en la sofo, aŭskultis ankoraŭfoje al la kuirejo, poste suprentiris la litaĵon. Li turnis la matracon kaj denove aranĝis la kuŝejon sur ĝi sed iomete levis la subtukon ĉe la malseka makulo kaj ankaŭ iom levis la kovrilon, por ke aero povu eniri.

Eble, pensis Hâkan, eble patrino aranĝos la liton nur malfrue hodiaŭ. Post la kalandrado ŝi devos tuj prepari por la matenmanĝo. Eble pasos duona tago, antaŭ ol ŝi aranĝos.

Li iris en la kuirejon kaj komencis enporti lignon. Nun dum la lerneja libertempo li ĉiutage prizorgis tiun laboron. Hodiaŭ li enportis ankaŭ ekstran korbon kaj faris belan lignostakon en la lignujo.

La loko, kie loĝis Hâkan, estis grandega, certe la plej granda en la vilaĝo. Ĝi havis tri domojn. En la plej malgranda el tiuj loĝis Valle. Kaj malantaŭ tiu estis malgranda ebena loko, kie Hâkan kaj Valle dum la lastaj tagoj konstruis kvaran domon, domon el neĝo, el neĝobuloj. Estis bulo ĉe bulo kaj bulo sur bulo, ĉambro apud ĉambro, pordoj kun arkaĵoj kaj tegmentoj kun kupoloj. Estis mirinde konvena mildvetero ĝuste nun.

Kiam Hâkan hodiaŭ transiris la korton, li krome havis ion, kion li prenis de la kristnaska laboro, kaj ion de la forno: kvar kandelostumpojn kaj alumetskatolon. La kandelojn ili metos en la neĝoĉambrojn kaj vespere lumigos ilin. Nenio estas komparebla kun brulantaj kandeloj en neĝobula domo. Same opiniis Valle. Sed tio estis ja ankaŭ malpermesita ludo.

Du horojn ili konstruis, poste venis la unua averto. Malagrabla subite ĝi venis, kaj la averto estis Eriko, kiu alvenis kaj elrigardis sub siaj fruntharoj, kvazaŭ li ion sciis.

— Hâkan, patrino volas, ke vi envenu!

Ĉu ankaŭ Valle jam scias ion, aŭ ĉu lia rigardo nur demandas? Granda kaj malagrabla maltrankvilo naskiĝis en Hâkan. Sed li restis ĉe Valle malantaŭ la malgranda domo. Li ne iris al la patrino.

Daŭris neordinare longe, ĝis la patrino venis. Kaj ŝi nenion

diris, kiam ŝi haltis ĉe la domangulo kaj rigardis lin. Sed ŝiaj okuloj aspektis precize tiaj, kiel li antaŭtimis. Nun estis ne nur maltrankvilo en li, venis ankaŭ glaciiga timo. Troviĝis sufiĉa kaŭzo, por ke la okuloj antaŭdiru malbonon.

— Mi estis survoje al vi ĝuste nun, patrino.

Hâkan iris al la domo, la patrino sekvis iom malantaŭe. Por momento la malgranda domo disigis ilin. Ĝuste tiam Hâkan subite saltis flanken, kuris ĉirkaŭ la domo kaj denove troviĝis sur la loko malantaŭ ĝi. Kiam la patrino venis sur la korton, neniu estis tie.

Ne, li ne volis honti ĝuste nun. Se temus nur pri la kandelo-stumpoj aŭ pri kiu ajn kanaĵlaĵo, Valle kaj la aliaj estus kun li kontraŭ la patrino. Nun li restos en kompatinda izoleco, kaj kiu ajn etulo povos ridaĉi antaŭ liaj okuloj: Hâkan Skog lastnokte malsekigis en sia lito.

Tio tamen estis ridinda provo prokrasti la aferon. Ĝi tiel fariĝos duoble pli malbona. Komprenoble patrino revenos por kapti lin. Kaj jen ŝi venis rapide, kaj ŝia vizaĝo estis tre ruĝa.

Hâkan vidis ŝin veni, kvazaŭ ŝi estus monstro. En sovaĝa timo pro la monstro li kuris rekte tra la neĝobula domo kaj rapidis for. Ankaŭ patrino kuris. Fariĝis pelĉaso tra la korto ĝis la pordo kaj la strato. Tie patrino ne volis persekuti plu. Ŝi haltis en la pordo kaj vokis la filon, kiu ankoraŭ kuris.

— Revenu, kanaĵlo! Revenu, mi diras!

Ŝi havis kaŭzon por diri tiel, ŝi havis kaŭzon esti tiel ruĝa en la vizaĝo. Tial Hâkan daŭrigis sian kuron, ĝis li ne plu vidis ŝin.

Kaj nun plenigis lin unu sola, memkomprenoble penso: Li ne povos reiri. Li neniam povos reiri hejmen. Kiu ajn havos rajton mortbati lin.

La bieno kun la tri domoj kuŝis ĉe la rando de la vilaĝo. Estis nur transversa strato al oriento, poste la domoj tuj maloftiĝis. Hâkan baldaŭ troviĝis en nekonata kamparo. Ĉe la domoj li faris kuriozajn rondirojn, kaj baldaŭ li apenaŭ sciis, kie li troviĝas. Tiel ankaŭ la aliaj ne povas scii tion.

Ke li neniam plu povos reiri estis tiel klare por li, ke li sentis tion kvazaŭ liberigon. Ĉio en la hejmo estis nun for, detranĉita. Nun li devas pensi pri la estonto, serioze komenci novan vivon.

La okjarulo en robeto kaj kun stoplotonditaj haroj preterpasis la lastan farmbieneton, travadis la neĝon ĉe krutaĵo en malnova skisaltejo kaj poste iris rekte en la grandarbaron. La suno ridetis vintre pale kontraŭ la piceoj, kaj gutoj falis el iliaj peltoj. Estas nura plezuro vadi en mildvetera neĝo, ĝi kvazaŭ varmigas lin per sia brile blanka moleco. Li venis pli malproksimen kaj surpaŝis veturvojon inter altaj neĝoremparoj. Tie estis pli malvarme kaj kvazaŭ pli silente. Sed estis tiel facile iri. Li bezonos nur iri orienten la tutan tempon.

Jes, Håkan jam sufiĉe klare vidis sian estonton. Se li tage kaj nokte iros nur orienten, li baldaŭ venos al la maro. Survoje li certe ricevos tie kaj tie iun panpecon, eble iu bona kamparanino donos al li eĉ pecon da patkuko. Kaj en la fojnejoj troviĝas fojno, en kiu oni povas dormi dum la noktoj. Ke serpentoj dormas en la fojno, certe estis nur babilaĵo de Erik. Poste, kiam li estos ĉe la maro, li kompreneble ŝtele suriros ŝipon. Li bezonos nur aperi, kiam la ŝipo estos malproksime sur la maro, akcepti vergadon kaj per laboro bonvoligi la ŝipestron.

Post dek jaroj li estos pli forta ol patro. Tiam li reiros hejmen, kaj ili spertos. Nu, ne por venĝo li revenos. Tiam li povos kondukti indulge amike kaj doni monon al ĉiuj.

Kun nova kaj libera animo Håkan paŝetis sur la silenta vintrovojo. Polico, serĉanoncado, grupa serĉado ne ekzistis en lia konscio, nun li estis malproksime de ĉio. Li preskaŭ surpriziĝis, kiam li renkontis homojn.

Vere venis tri arbarlaboristoj kun hakiloj, segiloj kaj mang-aĵo en tukligoj. Håkan tuj komprenis, ke li devas ion diri al ili. Okjara knabo ne senkaŭze iras sola en arbaro kvin kilometrojn de loĝolokoj.

— Diru, mi devas iri al Hemsjö — ĉu mi estas sur la ĝusta vojo?

— Jes, precize. — Ĉiuj tri aspektis vere surprizitaj.

— Ĉu estas longa vojo tien?

— Sufiĉe, por tia viro kiel vi ...

— Mi devas iri al Per Olsson tie, eble vi scias ankaŭ kie li loĝas?

— Per Olsson en Hemsjö — Mats-Per tamen ne nomiĝas Olsson — ne, ne, mi kredas, ke ne troviĝas iu Per Olsson tie.

— Tiel, nu dankon, mi — certe trovos lin.

— Sed — la hakistoj iom demande ridetis unu al la alia — ĉu vi iris la tutan vojon de Mullbo sen ĉapo?

— La ĉapon mi perdis en ravino ĉe la skisaltejo. Vi komprenas, patrino kuŝas malsana, mi devas iri al ŝia frato en Hemsjö.

La viroj ankoraŭ hezitis. Poste ili konsilis al li informiĝi en la unua domo dekstre. Kaj por la vojo tien Håkan ricevis du kvaronojn de pandisko kun porkoviando inter ili.

Kiam li denove estis sola li sidigis sin en sunluma loko sur la neĝoremparo kaj manĝis. Li ŝatis sidi en mildvetera neĝo, estis ia tikla nervostreĉo inter malvarmo kaj varmo. Verŝajne li estus restinta tie longe, sed la sunstrio forglitis inter la arboj, kaj la vintra taglumo fariĝis pli griza. Li devis levi sin kaj pluiri laŭ la kurba vojo en profunda arbaro kaj malsupren sur longaj deklivoj.

Estis mallume, kiam li fine staris sur la perono de la unua domo sur la dekstra flanko. Håkan verdire antaŭe ne konsideris la mallumon. Ankaŭ nun li ne estis klare konscia pri ĝi. La pensoj dum la lasta horo nur iris pli singarde kaj hezite. Lumantaj fenestroj aperis tie kaj tie, kaj malantaŭ ili, en la varmo, troviĝis homoj, kiuj ne bezonis kuŝi en fojnejoj. Verdire estis ĝuste tiu tempo, kiam li estus devinta havi sian lumfeston kune kun Valle.

Sed nun ekzistis nur unu ebleco por Håkan — plui kaj plenumi la decidon. Kaj li eniris en la fremdan domon, en varman, grandan kuirejon, kiu estis plena de grandaj homoj. Jen li staris interne de la pordo, tri viroj ĉe kafotablo mire rigardis lin, ankoraŭ unu granda viro en la sofangulo levis la rigardon de riparata ŝuo, kaj ronda virino ĉe la forno turnis sin.

— Ĉu vi eble havas iun fojnejon, kie oni povas dormi dum la nokto?

Tiun frazon multaj vagantoj uzis ĉe lia hejmo, Håkan diris ĝin aplombe kaj senzorge.

La virino kiel unua venkis sian konsterniĝon, sed tempo estis bezonata.

— De kie venas tia malgrandulo en tiel malfrua horo? Kaj eĉ sen ĉapo?

Håkan levis sian manon al la stoplaj haroj, tuj malpli aplomba.

— Mi — mi perdis mian ĉapon.

— Sed kie vi loĝas?

— En Mullbo.

— En Mullbo? — Ŝi rigardis la virojn ĉe la tablo. — Kia irulo vi estas! Tutajn dek kilometrojn! Venu kaj sidiĝu sur la sofon!

Nun eksonis ankaŭ la voĉo de la ŝuisto.

— Tio estas kurioza. Tamen iu estis kune kun vi?

— Ne. — Estis tiel, ke — ke — patrino volis bati min — kaj jen mi forkuris.

— Ĉu via patrino estas tiel malica?

— Jes. Mi perdis mian ĉapon kaj ne povis trovi ĝin.

— Kaj pro tio ŝi volis bati vin?

— Jes. — Håkan montris kunsentopetan vizaĝon.

— Kia satana virinaĉo!

Tio pri la ĉapo estis sukcesa. La simpatioj unuanime estis por Håkan. Virvoĉa murmuro de kunsento pluvis sur lin. Ĉiuj deziris ekscii, kiel nomiĝas tiu monstro, kiu estas lia patrino. Vere ili tuj veturos al Mullbo por komprenigi al ŝi, kiel ŝi traktas siajn infanojn. Håkan devis sidigi sin ĉe la tablo. Oni metis antaŭ lin grandan tason da kafo kaj du gigantajn tranĉaĵojn de kafopano, kaj li devis rakonti ĉion pri sia longa migrado.

Jen venis la demando, kiel ili aranĝu por li por la nokto.

— Metu lin sur la apogsledon*, John, kaj veturigu lin al lia hejmo, proponis la mastrino.

— Mi intencas iri orienten — al la maro, deklaris Håkan, kiu ektimis. La sofo malantaŭ lia dorso estis kvazaŭ minaca memorigo.

— Se John akompanos vin kaj parolos kun via patrino, vi ne bezonos timi.

Kaj la granda John apud la fenestro dismordis sukerpecon kaj tondris:

— Mi elportos ŝin, je Dio, se estos necese!

Håkan devis kontentiĝi pri tio, ke oni reveturigos lin hejmen.

Svede: Sparkstötting. Malantaŭe estas du fostoj kun transversa trabeto, antaŭ tio sidloko por eventuala veturigato. La veturanto staras malantaŭe kun la manoj apogitaj sur la trabeto, kun unu piedo sur unu el la glitiloj kaj per la alia glitigante la sledon per puŝoj kontraŭ la vojon.

Li sidis tie en la varmo kaj lasis la grandajn homojn agi. John iris en la subtegmentejon kaj alportis malnovan ĉapon por li. Li ricevis grandan jakon, per kiu li ĉirkaŭvolvis sin. Certe ne havis sencon protesti, li obee sidigis sin sur la apogsledon, kaj John elpuŝis ĝin sur la kurban ŝoseon.

La veturo en la mallumo fariĝis travivaĵo. Eĉ en la longaj alsupraj deklivoj Håkan ne bezonis deiri. Kaj duonvoje al la hejmo la vojo komencis iri malsupren preskaŭ kapturane. Håkan devis prementi sin inter la dorsapogo kaj la antaŭparto de la glitiloj, kaj en ĉiu kurbo li estis preta ĵeti sin sur la neĝoremparon. Sed John kondukis fermene kaj sekure.

En unu el la lastaj deklivoj kriis Håkan:

— Onklo!

— Jes!

— Onklo, mi volas, ke vi ne faru ion malbonan al mia patrino!

— Estu trankvila, mi ne faras ion senpripense.

Håkan cerbumis. Tiu giganto ne devus veni hejmen kaj ĉion detruiri. Absolute ne.

Tial Håkan diris, kiam li rekons la pordon de la najbara domo:

— Tie ĉi estas, onklo. Sed estas tute ne necese akompani internen, ĉar nun patro estas hejme, kaj mi ne timas. Dankon pro la veturigo! Multan dankon!

En momento li detiris de si la jakon kaj kuris. Li ne kuris en la najbaran korton sed rekte laŭ la strato en la mallumon. John eĉ ne trovis tempon por decidi, ke li sekvu lin, kiam li jam estis malaperinta. Longe la granda arbarlaboristo staris ĉe sia apogsledo kaj meditis. Poste li reveturis hejmen.

Ŝajne ĉiuj estis interne ĉe la granda korto de Håkan. Tamen li longe restis kaŝita en la siringa heĝo por aŭskulti. Ekstreme singarde li kaŭre iris laŭ la barilo kaj dekstren laŭ la kromdomoj. La pordo de la laborilejo estis fermita nur per ligna bastoneto, facile kaj senbrue li palpserĉis vojon tra ĝia peĉa mallumo. La ŝtupetaro staris en sia loko, la ŝtupetaro, kiu kondukis al la subtegmenta loketo. Kaj tie supre troviĝis malnova pajlo, sur kiu oni povas kuŝi.

Ili ne kredu, ke li lasas porti sin hejmen kiel hundidon. Kaj la ebleco, ke li memvole iru en la honton, eĉ ne ekzistis en liaj

kalkuloj. Ne, tie ĉi li povos satdormi. Frue en la mateno, antaŭ ol iu homo estos leviĝinta, li ŝtele forkuros kaj malaperos, malproksime flanke de tiu idiota domo en Hemsjö. Ĉu ili kredis, ke li nun iros al la patrino, kiu post tiom da tempo certe estas ankoraŭ pli furioza kaj ruĝa kaj minaca? Kaj dum tuta semajno havi la mokridon de la tuta bieno kontraŭ si?

Ne estis pli malvarme en la subtegmenta loko, ol ke la malgranda forkurinto vere sukcesis endormiĝi sur sia malmola pajlo. En profunda mallumo, en polvo kaj araneaj retoj li kuŝis bone kaŝita sub la tegmenta dorso. La korto ekstere, la giganta korto kun la tri domoj, ne plu estas lia korto. La loko malantaŭ la malgranda domo apartenas al pasinta tempo, al la infanaĝo. Håkan estas nun vagabondo, kiu ŝtelis tranoktejon. Anime kaj sonĝe li decidis iri kaj iri pli kaj pli malproksimen kaj sola adaptiĝi al ĉio. La granda tasko zorgi por si mem plenigis lin tute kaj solene.

Sed li vekigis pli frue ol li intencis. Ŝajnis al li, ke voĉoj vekis lin. Bone konataj voĉoj — strange tamen — sed jen, nun ĉio estas tute klara — patro kaj Erik interparolas malsupre en la laborilejo. Kiel ili nur povis ekscii — sed verŝajne ili venis nur por preni ion. Kompreneble, jam ili estas survoje eksteren.

— Erik, mi tamen aŭdis ion tie supre.

— Tion vi nur imagas, patro. Mi ja estis tie kaj serĉis.

— Ĉu vi ĉie prilumis?

— Kompreneble. Mi ne vidis eĉ muson.

— Ĉu vi lumigis ankaŭ malantaŭ la malnova lito?

— Jes — ne — ne tute precize tie ...

— Mi volas iri supren ankaŭ mi.

— Absolute ne necese, patro. Sed jen prenu la lampon, mi apogos la ŝtupetaron por vi.

La voĉoj sonis tiel nelaŭtaj kaj malgajaj, kiel Håkan neniam antaŭe aŭdis ilin. Doloris en la brusto, kiam li aŭdis ilin. Li devas ŝajni, ke li dormas — estu preteksto pro tio, ke li ne anoncis sin. La patro trovis lin en la pajlo malantaŭ mallongflanko de la lito kaj devis skui lin, antaŭ ol li malfermis la okulojn.

Senvorte silenta kaj obstinmiena Håkan sekvis lin. Li venis sur la korton kaj supren sur la ŝtuparo kaj en la kuirejon, al

patrino. Io en li obstine kunpremis sin en atendo pri la puno. Nur batu, batu kiom vi nur povos!

Strange estis, ke la vizaĝo de patrino tute ne aspektis ruĝega kaj furioza. Ĝi brilis, kaj estis larmoj en la okuloj. Bona rido venis de ŝi, kiam ŝi demandis, de kie li ricevis la malnovan ĉapon. Ŝi varmigis liajn manojn per frotado kaj pelis lin al la tablo, kie atendis la vespera kaĉo. Ŝi ŝutis amason da sukero sur lian kaĉon. Maj sidis sur la benketo apud la lignujo kaj rigardis lin envie.

— Verdire vi meritus vergadon, diris patrino.

Sed tamen estis preskaŭ tiel, kvazaŭ ŝi volus pardonpeti pri io.

La vespero en la hejmo de Håkan estis strange feliĉa. Erik faris tutan detektivan romanon pri sia provo sekvi la postesiginojn ĝis la skisaltejo de Mullbo. La patro, kiu senprokraste iris al la polichelpanto por informi pri la reveno, revenis kun preskaŭ solena ĝojo en sia vizaĝo. Håkan trovis sin esti mezpunkto de io eksterordinare grava. Li ne sciis precize kion. Tiu afero en la mateno — eble li povas subsenti ĝin kiel ŝercan brileton en la okuloj de patrino — cetere ĝi estis kvazaŭ neniigita — for — neniam okazinta. Tio tute eksterordinare grava devas ja esti, ke li revenis. Kaj antaŭ tiu kurioza fakto Håkan moliĝis, eĉ diris kelkajn vortojn pri la aventuroj dum la tago. Nur kelkajn vortojn, hezitajn kaj singardajn.

Li intense cerbumis, kiam li kuŝigis sin en sian sortopezan sofion. Tutan horon li kuŝis cerbumante. La grandaj homoj montris ion novan, ion, kio por Håkan estis absolute nova. Sed la problemo estis tro malfacila por li. Li endormiĝis, antaŭ ol li povis solvi la enigmon de sia valoro en la hejmo kaj kiel forkurinto. Li kaptis ĝin nur kiel ion nedireble gravan.

(El la sveda manuskripto tradukis S. Engholm.)

Kaj poste Pinokjo

De F. SZILÁGYI

Antaŭ kelke da tagoj mi relegis la ĉarman fabellibron de Colodi pri Pinokjo, kaj mi rememoris la filmvarianton de tiu fabelo. Eble ankaŭ vi vidis ĝin, kaj eble ankaŭ vi legis la libreton. Sed se ne, mi provas resumi per kelke da vortoj, kio estas la enhavo de la libro, respektive tiu de la filmo.

Infankora maljunulo vivas sola inter siaj memfabrikitaj ludiloj, pupoj. Ludfiguretojn li fabrikas, novajn kaj novajn, por ĝojigi la infanojn kaj krei plezuron al si. Foje li superas sin mem, kaj lia lerta mano donas formon al tre bela knabfiguro el ligno. La knabeto estas perfekta, ĉarma, kaj la maljunulo havas nevenkeblan deziron vidi la figureton movi sin. Iun belan nokton la Sopirstelo plenumas lian deziron, kaj Pinokjo, la ligna knabeto, ekmovas sin kaj moviĝas libere, tute simile al aliaj infanoj. Sed ... sed Pinokjo ne estas ankoraŭ vera knabo, li ne havas animon similan al tiu de la veraj knaboj. Sekvas penoplenaj tagoj, kaj foje Sopirstelo konstatas, ke Pinokjo meritas iĝi vera knabo, ĉar li forgesis sin mem por savi la maljunulon, kaj tiam okazas la miraklo: Pinokjo subite venkas ĉion, kio ankoraŭ estas ligno en li, kaj ekvivas kiel vera, vera knabo.

La filmo finiĝas per tio, ankaŭ la libro, kaj foje mi provis rakonti la historion al knabeto, kiu estis tre kontenta pri la fabelo. Sed poste mi pensis pri mi mem, kaj mi sekvis denove la formiĝon de la fabelo, kaj mia infanmemo, nedisigebla de la alia, tiu, kiu kreskas kaj maljuniĝas, diris al mi:

Kiel vi daŭrigus tiun ĉi fabelon?

Mi iom meditis kaj poste ekrakontis:

*

Pinokjo, la nova, eta, vera knabo suĉis la plezurojn, ĝuis la vivon kaj amis ĝin. La vivo estis tre, tre interesa. Brilis la suno, la printempo estis varma, susuris la floroj, kaj plaŭdis la fontoj. Ĉio estis mirinda. Iom post iom Pinokjo lernis skribi kaj legi, kalkuli kaj ekkoni la ĉirkaŭan vivon. Li estis saĝa knabo, kaj tre frue li komencis legi la ĉiutagan gazeton, el kiu multe da scio kaj multe da saĝo radiis al la freŝa cerbo de la knabeto. Aŭtoj gaje trumpetante preterkuris la domon, kie Pinokjo vivis

kun la maljunulo, kun sia ludema kato kaj kun la orfiŝeto en la akvario. Vespere sonis la radio, kaj la loĝantoj de la dometo endormiĝis ĉe dolĉaj sonoj de bela muziko. Se Pinokjo estis mal-sata, kvin kontinentoj superŝutis lin per delikataĵoj, kaj li ne multe aŭdis pri tio, ke ie, ne tre malproksime, estis ne tre multaj homoj, kiuj vivis en malpli enviindaj cirkonstancoj. En la dometo estis ĉio en plej granda kaj plej agrabla ordo. Se li longe promenis en la apuda arbaro kaj ekdeziris ion varman, rapidaj ŝipoj, venintaj el Sudameriko, prizorgis, ke li povu trinki kafon; teo, bananoj, ananaso venis el alia direkto. Kafo vaporis sur la tablo, kaj oni povis meti en ĝin multe da sukerpecoj, manĝi kukojn, fruktojn kaj ĝoji pri la bela, bona, komforta, nova kaj vera vivo. Se li volis variigi la vivon de la dometo, li povis veturi per trajno aŭ per aŭtobuso, li havis esperon ricevi propran aŭton, foje li veturis eĉ per aeroplano. La urboj kaj lokoj, kiujn li vizitis, estis belaj, vastaj, komfortaj, kaj lia rigardo preterpasis la ombrojn kaj la mallumon, kiun oni volis kaŝi. Ne estis konvene por nova, vera knabo rigardi ilin. Cetere ili estis ja malaperontaj, oni kredis. Se li ne volis forlasi sian hejmon, li povis telefoni al siaj amikoj.

— Mi estas nova knabo, diris Pinokjo, sed mi devas diri, ke ĉio ĉi estas mirinda. Ne estas io pli potenca kaj pli bela ol la civilizo.

Kiel mi plektu la vortojn? Sufiĉas diri, ke Pinokjo havis belan vivon, li estis ja juna kaj nova knabo, kaj li tute forgesis, ke iam li estis el ligno. La vivo vige pulsas en li, kaj li donis sin tute al tiu pompa sento, kies nomo estas senmanka juneco. Ĉio estis korplenige bela, kaj por kompletigi ĉiujn plezurojn, li iam eĉ eklernis esperanton kaj komencis korespondon pri amuzaj aferoj kun knaboj kaj knabinoj en la tuta mondo.

*

Pasis kelkaj jaroj. Pinokjo estis ankoraŭ juna kaj nova knabo. Oni montris al li karton kaj diris: — Rigardu, Pinokjo! Ĝis tiu ĉi dika, nigra linio la homoj estas bonaj, sed trans ĝi ili estas homaĉoj. Iom poste la instruo iomete ŝanĝiĝis, kaj oni diris: — Trans la limo vivas fihomoj. Ĉu vi komprenas, Pinokjo?

Pinokjo jesis per la kapo kaj diris: — Mi estas preskaŭ tute

nova knabo, kaj vi ĉiuj estas tiel saĝaj. — Kaj de tiu tago li faris akran diferencon inter la homoj.

Ankaŭ en aliaj landoj estis multe da etaj Pinokjoj, kaj ili ricevis la saman instruon. Kaj inter ili estis jam kelkaj, kiuj pensis kun malestimo pri Pinokjo. Li ricevis eĉ malĝentilan leteron — imagu — en esperanto. Entute lia korespondado malpliĝis, kaj ankaŭ la radio iom post iom ĉesis esti ĝojofonto. Oni aŭdis en ĝi pli kaj pli da krudaj vortoj, insultoj en ĉiuj lingvoj kaj inter ili eĉ en esperanto. La propralanda radio muelis ĉiam kaj ĉiam la samajn aferojn dum tiu jaro, kaj Pinokjo ne plu aŭdis ĝin tiel volonte.

Foje komenciĝis la milito. Oni devis militi, tio estis ja natura afero, neevitebla, natura leĝo, kaj tion oni sciis en multaj landoj, ankaŭ en la lando de Pinokjo. La maljunulo — bedaŭrinde — ne sendis Pinokjon, antaŭ ol li iĝis vera knabo, al iu pli bona lando, kaj do Pinokjo subite staris meze en nova situacio. Mi fakte ne scias, ĉu la lando de Pinokjo estis atakanta aŭ atakata, el la gazetoj tio ne klariĝis, sed oni diris: — Oni devas defendi sin kaj siajn interesojn, kaj la plej bona defendo estas atako.

Mi ne povas diri, ke Pinokjo tuj komprenis ĉion, kion oni diris al li, sed fine li diris denove:

— Mi estas relative nova knabo, kaj la homoj estas tiel saĝaj. Estas malfacile konstati, kie estis la komenco, sed nun estas ja egale. La milito estas fakto, kaj mi povas fari nenion kontraŭ ĝi, same kiel la aliaj, kiuj ne estas novaj knaboj kiel mi.

Pinokjo havis belan ĉambron kaj bonan liton, sed nun li ofte devis nokte forlasi sian liton kaj rapidegi kun siaj maljunulo, fiŝo kaj kato en la bombŝirmejon. Lia adopta patro konsiderinde maljuniĝis, kaj li ne povis tiel rapide kuri kiel Pinokjo, kaj tiel okazis, ke foje li mortis dum flugatako. Pinokjo tiam ploris dum longa tempo. Sed ankaŭ poste li ofte kuregis en la bombŝirmejon. Ĝi estis malvasta kaj nekomforta, kaj la muĝo de la bombmaŝinoj ne estis lulkanto.

La vivo estis interesa, sed ne bela. Oni ne plu ŝatis uzi la radioaparaton, ĉar oni ne povis aŭskulti tion, kion oni volis, kaj tiel ĉesis la potenco de la radiosorĉo, tiel venis denove en la vivon la despotismo de la malproksimo. Ĉio, kio iam estis proksima kaj ĉiam venis pli kaj pli malproksimen, foriĝis en la spacon. Oni

eble povis skribi leteron al aliaj landoj, sed oni devis atenti, oni observis la leterojn kaj ĉion en la vivo por la intereso de la propra lando. Oni skribis nur pri privataj aferoj, sed oni ne povis scii, kie komenciĝas la publikaj aferoj, kaj kie finiĝas la privataj. Ĉio estis danĝera. La privata vivo fariĝis pli kaj pli malvasta. La aŭtoj ne havis benzinon, la oleo estis necesa por estingi la vivon de aliaj Pinokjoj. La kontinentoj, kiuj iam tiel servoprete zorgis pri la bonfarto de Pinokjo, nun malaperis en amaso de eksplodminoj, kaj en Sudameriko oni verŝis kafon kaj ananason en la maron, ĉion tunkvante. Oni komencis senti malsaton, kaj malsanoj venis. Oni perdis sian loĝejon, kaj oni palpadis vespere sur mallumaj stratoj. Oni eĉ timis la lunlumajn, belajn, helajn noktojn. Kaj kiu sciis rapide prinombri ĉion, kio renversiĝis kaj iĝis aĉa en la vivo.

Sed Pinokjo ne perdis la esperon kaj la kredon pri la homoj.

— Mi ankoraŭ estas nova knabo, kaj ili devas esti saĝaj.

Tiel daŭris dum jaroj kaj jaroj, kaj fine ankaŭ Pinokjo venis al la fronto. Li loĝis en tendoj, en tranĉeoj, en grotoj, tranoktis en marĉo, ŝvitis, frostis, sangis, sentis doloron, ŝirmis sin, defendis sin kaj sekve ankaŭ murdis. Kiam perdiĝis por li ĉio, kion li ŝatis, kaj kio plibeligis la vivon, kiam ĉio, kion oni nomis rezulto de la civilizo, servis nur por unu celo, por ekstermo de alia vivo, kiu volis murdi lin, tiam li subite forgesis, ke li estas nova knabo, kaj ekĝemis al la Sopirstelo, lumanta dolore super la batalejo:

— Ho, Sopirstelo, se mi denove povus esti ligno!

La Sopirstelo aŭdis la deziron de Pinokjo. En la sama momento kuglo trafis lian koron. Oni enterigis lin, arbo kreskis el lia korpo, oni faligis la arbon, el la arbo fariĝis ligno, kaj maljunulo, infankora maljunulo, kiu vivis sola inter siaj memfabrikitaj pupoj, luĉiloj, iun tagon donis formon al tre bela knabfiguro el la ligno. Tiu figuro estis ...

Kaj tiel komenciĝas denove la historio de Pinokjo ...

*

Mia knabo-aŭskultanto, tio estas mi mem, ne estis kontenta pri la fabelo. Li prenis la mienon de literaturkritikisto kaj diris:

— Nu, ĉu vi rakontas tian pesimistan historion al mi? Ĉu tio

havas sencon? Oni scias ĉion, kaj oni ne deziras tiel realan fabelon.

Mi respondis: — Mi ne scias. Sed mi ŝatus per ĝi atingi la estontan Pinokjon, por averti lin pri la daŭrigo de la rekomenciga fabelo. Por ke la daŭrigo ŝanĝiĝu!

Estonteco de idealismo

De AJO ALLINGER

Ni staras meze en giganta proceso de transformiĝo. Ni vidas dum la aktuala milito, kiel ĉiuj valoroj estas mezurataj alie ol antaŭe, kiel malnovaj idealoj kaj sociaj formoj estas ŝetataj en fandujon. Grandaj partoj de la homaro kun profunda optimismo anticipas la venontan evoluon. La armita potenco eksterme tretas sur ĉiun idealismon ĝermantan sub ĝia fera kalkanumo. Ĉie ni vidas, kiel oni pledas al perforto kiel sola solvo de konfliktoj. La rajto sidas en la pinto de la bajoneto. Ĉu jen temas pri la brutala lukto pro la ekzisto en ĝia origina sovaĝa teruro, kiu nun revekiĝis en la civilizita mondo? Ĉu devas mutiĝi ĉiuj ideecaj klopodoj en la muĝo de la armiloj kvazaŭ plorado de infano? Ĉu nur la banala materialismo povas aŭdigi sian voĉon, parolante per la tondro de mil kanonoj?

Kiam ni levas tiujn demandojn kaj eble kelkfoje inklinas respondi al ili per rezigna jes, ni tamen pripensu, ke ni troviĝas meze en transformiga proceso, ke nur malmultaj kapablas superrigardi la situacion en ĝia tuta amplekso. Malfacile povis la homoj ĉirkaŭ la unuaj vapormaŝinoj antaŭvidi la evoluon, kies komencon ili ĉeestis: eksterordinaran kreskadon de la loĝantaro, ekspluatatan proletaron, la naskiĝon de movado laborista kaj fine la liberiĝon de la homo de la peza animmortiga krudlaborado. La finrezulto de ĉi tiu transformiga proceso sin kaŝas por nia scio. Sed estas kvazaŭ la naturo havus celkonscian intencan konduki la homojn tra jarmilionoj antaŭen al donita fincelo ...

Se ni reregardas sur la etapojn, kiujn nia gento tramigris survoje al la homo, ni tamen trovas, ke ni migris antaŭen! Ni ne plu manĝas homajn kadavrojn, kio — laŭ la horloĝo de la naturo — antaŭ ne tro longe estis ĝenerala kutimo. Ni ne plu mortigas la maljunulojn kaj malsanulojn — eble tridek generacioj iris en la tombon, de kiam tio estis normala fenomeno. Nova speco ne trovas sian findeciditan formon eĉ dum kelkaj jarmiloj. La stranga bestospeco, kiu sin nomas homo, estas ankoraŭ juna sur la tero kaj staras ankoraŭ en la komenco de sia evoluo.

Kelkfoje oni trovas, ke bestospeco dum tre mallonga tempo montras rapidan transformiĝon. Oni estas tentata kredi, ke la homo nun travivas ion similan. Jam nun grandaj partoj de la homaro estas ekregataj de la kredo, ke milito ne estas normala fenomeno. Tio vere estas novakiro en nia vivkoncepto. Antaŭ ne longe la milito estis la normo, la paco nur spirpaŭzo antaŭ nova batalado. Eble post kelkaj malmultaj generacioj la milito apartenos al la malhelaj rememoraĵoj de la genta vojo al la homo.

Kiom ajn malhelaj la nubegoj de la maltrankvilo amasiĝas, kiom ajn for de sia idealo la homaro devojiĝis, ni ne maltrankviliĝu — profunde en la interno de la homaro staras skribita la leĝo, ke la spirito regos super la materio, ke vero kaj rajto daŭros, kaj ke *la esence homa* interne de ni iam venkos super tio en ni, kio foje taŭgis en la lukto pro la ekzisto kontraŭ malplaĉaj proksimuloj: la arda malamo, la senkonscia kolero, la instinkto mortigi kaj ekstermi.

Ĉi tiu militego, elkatengita fare de demagogoj en la diktaturaj landoj, sendube estas nukobato por ĉiu, kiu kredis pri kaj laboris por la mondpaco. Ke tiuj klopodoj fiaskis tamen ne deprimu nin. Kiu lernis pensi laŭ skalo mondhistoria, tiu jam scias, kiom etaj estas la kokopaŝoj, kiujn la civilizacio sukcesis fari ĝis nun. Ekstere mezurite la homo ja fariĝis la sinjoro de la mondo, sed interne mezurite li restas la sama besto: kaduka kaj kompatinda viktimo de teruro kaj ektimo, de hereditaj kutimkonceptoj kaj amaspikozoj. Ĝuste en tiuj tempoj de timego disfalas la pozicioj de la kulturo. Elpaŝis la sovaĝa besto de abomena aspekto. Hodiaŭ milito estas pli danĝera ol iam antaŭe,

ĉar la sovaĝbesto posedas ĉiujn rimedojn de la moderna tekniko kaj uzas ĉiujn formojn de senskrupula propagando.

Je kelka tempo la kulturo ja devas flankeniĝi, sed ĝia spirito estas eterna. Venos la tago, kiam la sovaĝbesto retiriĝos en sian kavon, venos la tago de katastrofo ankaŭ por tiuj rabistoj, kiuj en la nomo de la civilizacio invadas pacajn landojn. Tiam reko-menciĝos la klopoda laboro de la novkonstruado.

Ni ĉiuj estas firme katenitaj unu al la alia per komunikiloj spiritaj kaj materiaj, per la tuta reto, kiun per mil fadenoj teksas ĉirkaŭ nin la mondsocio. Kaj tio jen estas la savo por la paco! La ĉagreno pri la pacrompantoj leviĝas konkorde al la ĉielo. Iam milito tamen malebliĝos! Same kiel la polico sur la strato kaptas krimulon, same la popolaro en estonta epoko rapide sendanĝer-igos la pacrompulojn. Sendube, la barbereco ankoraŭ multfoje rompos niajn digojn, sed ree kaj ree ni konstruos novajn rem-paraĵojn kontraŭ la disfalo. Kaj en ilia ŝirmo kreskados *la Nova Homaro*.

AŬTUNO.

*Malvarma vento venas el la nordo.
Silente kiel ombroj sin fortrenas
sub la ĉielo grizaj, pezaj nuboj.
La floroj velkis, la verdaĵ' flavigis,
kaj frue venas la vespera tempo.*

*Disfalis teren ruĝaj rospetaloj
en la ĝardeno, kiun mi prizorgis,
kaj nudaj, nigraj ĉie sin etendas
la iam gajkoloraj florobedoj.*

*Saŭmantaj ondoj bruas ĉe la bordo.
En malproksim' kolimbo alte ŝvebas
kaj ĝeme krias super nigraj akvojoj.
Malgaje sub la nuboj gruoj vokas,
migrante suden al sunplenaj landoj.*

Stellan Engholm.

Klubaj taskoj

De STELLAN ENGHOLM

Mia sperto pri esperantoinstruado kaj kluba laboro estas limigita kaj ne ampleksa. Mi ne povas diri: tiel kaj tiel vi devas fari por bone sukcesi. Malgraŭ tio mi volas iom paroli pri la afero.

La kluba laboro estas fundamente grava por la movado. Se la grupoj ne laboras bone kaj prospere, la tuta movado malprogresas. Ĉu nia malprogreso aŭ almenaŭ stagno dum la lastaj jaroj ne dependas grandparte de tio? Se jes, kio estas la rimedo? Tiu demando ŝajnas al mi traktinda. Ĉar mi por tiu ĉi numero ne sukcesis ricevi alian artikolon pri la temo, mi volas almenaŭ atentigi pri la demando kaj doni kelkajn vidpunktojn. Vi povos kompletigi ilin per artikoloj aŭ rimarkigoj.

Unue: kio estas la senco kaj celo de la kluba vivo? La demando vere estas banala — sed ĉu ĉiuj el ni efektive bone analizis ĝin kaj faris la sian por ke la kluba laboro funkciu laŭ la respondo? La senco kaj celo de la kluba vivo kaj kluba laboro estas — tio estas la unua ŝtupo — krei kiel eble plej bonajn esperantistojn, lingve kaj spirite. Memkompreneble tiu abstrakta afero, kiun ni nomas organizo, ne plenumas tiun taskon. Estas la membroj mem, kiuj per bona volo kaj bona laboro devas fari el si mem tiujn kiel eble plej bonajn esperantistojn.

En multaj ideaj movadoj okazas, ke la grupoj stagnas kaj velkas pro tio, ke multaj membroj enuas dum la kunvenoj. Ili mem ne havas ion por fari, kaj la kunvenoj estas tro malmulte amuzaj. Ili sidas tute pasivaj sur siaj lokoj kaj por ĉiu fojo fariĝas pli kaj pli pasivaj, ĝis ili ne plu venas. Tiel okazis ankaŭ en esperantaj kluboj.

Sed ĉu ne estas strange, se membro estas pasiva kaj enuas en esperanta klubo, kies celo estas ĝuste aktiva laboro de ĉiuj partoprenantoj? La klubo, la organizo, estas ja la rimedo por ebligi tiun laboron. Kaj laboro vere ne mankas. Nia lingvo estas facila, sed por fariĝi bona esperantisto oni tamen devas multe klopodi. Kaj — se oni nur komencis vere serioze labori, la laboro fariĝas tre interesa kaj agrabla, eĉ pli agrabla ol amuziĝaj vesperoj.

Kion oni faru, kaj kiel oni organizu la laboron, tio dependas

grandparte de la nivelo de la klubo. Sed mi pensas nun unualoke pri negrandaj, vegetantaj kluboj, kie la plimulto de la membroj ne povas legi nek paroli nek skribi nian lingvon, kiel ili devus. Ke tia klubo unu fojon aŭ du fojojn en la monato havas organizforman kunvenon kun protokollegado kaj nombro da seninteresaj programpunktoj nur por imiti aliajn organizojn, tio ne havas sencon. En tia klubo, se tia ekzistas, oni devas forĵeti la parlamentajn formojn, kaj interkonsenti, ke oni unue lernu legi, paroli kaj skribi kontentige bone. Tion oni ne lernas per aĉeto de iu libro kiun oni iom foliumas kaj poste formetas, nek per iomete da lingva traktado dum parlamentsimila kunveno. Por tion lerni oni kunvenu ekzemple unu fojon en ĉiu semajno por komuna laboro: legado, interparolado, skribado. Oni aĉetu facilan, bonstilan libron. Ĉiu havas sian ekzempleron, kaj hejme ĉiu fidele tralaboras la taskon por la venonta kunveno. Tiam oni kontrolu, ke ĉiuj komprenas la enhavon, se necese, kaj cetere per komunaj klopodoj eltiru el la teksto ĉion instruan, kion oni povas trovi rilate al vortoj, frazoj, esprimmanieroj, gramatikaj detaloj ktp. Ofte la teksto bone taŭgas por parolekzerco. Same ĉiu skribas hejme sian skribekzercon, ĉu tradukan ĉu originalan, kaj dum la kunvenoj oni same traktas ilin per komuna analizo. Kaj ne forgesu la parolajn tradukekzercojn. Oni povas komenci per simplaj anekdotoj kaj iom post iom malfaciligi la taskojn, ĝis oni senprepare povas traduki tutajn rakontojn.

Por komuna legado estas bonegaj la verkoj de Zamenhof — kiel mi sugestis en la oktobra numero de Sv. Esperantotidningen — kaj same "Vivo de Zamenhof" de E. Privat kaj "Historio de la lingvo esperanto" de la sama aŭtoro. Per ili oni lernas ne nur la lingvon sed konatiĝas ankaŭ kun la spirito de la tuta movado, afero same necesa kiel la lingvoscio.

Se klubo tiel laboras dum du jaroj de frua aŭtuno ĝis malfrua printempo, tiam la membroj certe faras rimarkeblan progreson, ĉiukaze mi spertis tion.

Kaj tamen tio ne sufiĉas. Neniun lingvon, ankaŭ ne esperanton, oni finlernas per pli malpli da grupa studado. Por tio estas bezonata multe, tre multe da individua laboro. Sed el tiu komuna laboro iom post iom naskiĝas pli kaj pli da memstara legado kaj skribado kaj speciala studado. Sed post tio oni vere regas espe-

ranton same bone kiel sian gepatran lingvon. Kaj multajn jarojn oni ne bezonas por tion atingi, se oni nur serioze laboras.

Mi kredas, ke la sama labormaniero estas konvena por grandaj kluboj, kvankam mi tute ne havas sperton pri tio. Kompreneble ankaŭ vigla kaj prospera klubo povas uzi ĝin. En granda klubo la membroj povas formi diversajn, ne tro grandajn rondojn, kiuj laboras laŭ la sama metodo. Verdire tio estas ja nur la studronda metodo. Sed kiel fari, se granda klubo havas klubkunvenon ĉiu-semajne kun protokoloj, paroladoj, teatraĵoj, kantado, muziko, demandosporto, danco ktp., kaj se la pli multaj ne povas dediĉi ankoraŭ unu vesperon al esperanto? Laŭ mia opinio ili tre bone agus, se ili en tia okazo maloftigus la klubkunvenojn kaj uzus la liberajn vesperojn por fervora laboro en malgrandaj studrondoj — se ili ne estas ĉiuj jam tre lertaj. Kaj se la pli multaj estas tre lertaj sed kelkaj nelertaj, tiuj lastaj certe farus pli valoran laboron por si mem kaj por la movado, se ili partoprenus studrondan kunvenon anstataŭ la ĝeneralan kluban.

Kiam mi tralegas tion, kion mi ĵus skribis, mi vole nevole demandas min, kion diros la legantoj pri tio. Estas ja tiel simplaj, memkompreneblaj aferoj, ke povas ŝajni eĉ sencece paroli pri ili. Jes, estas. Kaj tamen, ĉu tia laborado ne estas bezonata, tre bezonata, kaj ĉu ĝi ne mankas en multaj lokoj, kaj ĉu oni ne povas plibonigi ĝin en lokoj, kie ĝi ekzistas? Aliflanke mi bone scias, ke neniuj metodoj kaj neniuj laboro faras miraklojn, ke la rezulto malgraŭ ĉiuj klopodoj ofte estas malgranda. Tamen ni devas labori. Sen laboro oni nenion atingas. Kaj tial ni ĉiuj, kiuj iom pli multe scias kaj konas, devas fari ĉion, kion ni povas, por vigligi ĉiujn, kiuj vegetas kaj enuas pro manko de laboro kaj intereso, veki ilian memkonscion kaj laborkapablon. Se ili nur komencos serioze kaj metode labori, ili baldaŭ eksentos la grandegan ĝojon de persista, celkonscia studado. Poste la resto estas facila.

Per tio ĉi mi atentigis pri la demando. Certe multaj el vi povas doni aliajn sugestojn pri praktika laboro. Faru tion! Ni ĉiuj havas la saman opinion pri nia lingvo kaj nia movado, niaj esperoj kaj deziroj estas por ni komunaj. Ĉu ni ne devas ankaŭ komune fari ĉion, kion ni povas, por aktivigi inertulojn, gajni novajn membrojn kaj progresigi la tutan movadon, same kiel ni

devas trovi manierojn por kiel eble plej bone utiligi nian lingvon kaj nian movadon por la bono de la homoj?

Mi diris komence, ke eduki bonajn esperantistojn estas la unua ŝtupo de kluba vivo kaj laboro. La duan ni atingos, kiam la membroj de la kluboj estos tiel perfektaj esperantistoj lingve kaj spirite, ke la kluboj povos fariĝi veraj centroj kaj interligaj punktoj por homarkomuna kulturo, por interpopola komuneco. Sed ĝis ni povos okupi nin pri tiaj pli grandaj taskoj, ni bone solvu la elementajn.
